# *Panamo prioritatos sekurecon kaj bonajn praktikojn dum sia prezido en la regiona mekanismo SICA.*

Panamo, 17 jul (RHK-PL) La panama prezidento Juan Carlos Varela, klarigis la prioritatojn de sia lando rilate al sekureco kaj migraj fluoj dum sia provizora  prezido de la Sistemo de Centramerika Integri?o (SICA).

Dum kunsido kun la ?enerala sekretario de la regiona organizo, Marco Vinicio Cerezo, la  panama ?tatestro detaligis la defiojn alfrontatajn de la regiono, kiel kresko en la produktado de drogoj en najbaraj landoj, la nova migra politiko de Usono kaj la migrado de venezuelanoj pro la nuna situacio en tiu lando.

Varela, akompanate de de vicministro pri eksteraj rilatoj Luis Miguel Hincapié, ree esprimis ke Panamo subtenos kaj donos  siajn kapablojn al la alianco por prospero, kaj samtempe impulsos inter?an?on de informoj kaj bonaj praktikoj por fortigi la publikajn politikojn kaj efike batali kontra? la organizita krimo en la regiono, la? noto de la prezidanteco.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/135798-panamo-prioritatos-sekurecon-kaj-bonajn-praktikojn-dum-sia-prezido-en-la-regiona-mekanismo-sica

**Radio Habana Cuba**